## Redakta noto

ISAE-anoj bone scias, ke ISAE estas fondita en la jaro 1906. Tion jam klare diris prof. *Paul Neergaard* en sia antaŭparolo de "Sciencaj Studoj", festlibro eldonita en 1956 okaze de la 50-jara ekzisto de nia Asocio. Sur kromfolio, kuŝanta en mia ekzemplero de Scienca Revuo Vol. 23, n-ro 1/2 (93/94), presita je la 25-a de aprilo 1972, mi nun trovis la sekvajn liniojn:

"Scienca Revuo aperadas, pli aŭ malpli regule, ekde la jaro 1949. Post unujara paŭzo en 1961, ĝian aperigadon transprenis (de la antaŭa, privata, eldonisto *J.Muusses* el Nederlando) la Internacia Scienca Asocio Esperantista mem. Redaktata kaj presata en Jugoslavio, ĝi maturiĝis sufiĉe por transiri ekde la Vol. 21 al 6 numeroj jare po minimume 32 paĝoj. Pli frue ol Scienca Revuo, en Esperanto aperadis kelkaj sciencaj periodaĵoj, el kiuj la plej menciindaj estas: Internacia Scienca Revuo (aperis jam ekde 1904), 8 grandformataj volumoj kun multe pli ol 4000 paĝoj), kaj Bulteno de ISAE (ekde la jaro 1926 ĝis la Dua Mondmilito). **ISAE mem estas fondita en 1906, en Ĝenevo, restarigata en 1922, kaj denove en 1947.**"

Scienca Revuo tiam aperis sub la lerta "ĉefa kaj respondeca redaktoro" (kaj samtempe prezidanto de ISAE) prof. d-ro *Božidar Popović*, helpe de vicprezidanto d-ro *Carl Støp-Bowitz* kaj ĝenerala sekretario d-ro *Josef Kavka* – nu, tiuj ISAE-gravuloj ja vere devis scii la faktojn. Kaj la supra teksto same klare kaj nerefuteble ornamas la kovrilpaĝojn de multaj SR-kajeroj. Mi kopias, dorsflanke de tiu ĉi kajero, faksimilon de la unua kajero de sinsekvo de ok volumoj de Scienca Revuo [nome ekde Vol. 21 (1970) (1) n-ro 81 ĝis Vol. 28 (1977) (6) n-ro 128] por ke ankaŭ novaj legantoj de Scienca Revuo sciu la fondojaron de ISAE.

La delegita reto de la hodiaŭa ISAE (pro la novalveno de delegitoj por Danlando, Hungario kaj Bulgario, kiujn ni kore bonvenigas) plialtiĝis al nuntempe 20 landaj delegitoj kaj perantoj de ISAE, kiuj aktivas por nia Asocio en siaj hejmlandoj. Tiu nombro tute ne malfavore kompariĝas kun la tiama delegita ISAE-reto en 1972 kun entute 26 Landaj Delegitoj.

Ni estas atingintaj la regulan aperon de 4 SR-kajeroj jare. Mia persona deziro por nia centa fondojubilea jaro 2006 dependas de la kunlaboro kaj entuziasmo de la ISAE-anoj mem: nome ne nur "iam estonte" – sed plejeble baldaŭ, eĉ nun! – plialtigi la aperigon de Scienca Revuo al 6 kajeroj jare. Ek al la laboro, karaj potencialaj aŭtoroj! Ĉu la eldono de ses sciencrevuaj kajeroj po 1 jarkolekto jam eblos por tiu ĉi jaro de nia centjariĝo?

Tio estus vere la plej bona kaj kuraĝiga omaĝo al centjara ekzistado!

*Prof. d-ro Rüdiger Sachs*, prezidanto de ISAE



# La Romia Imperio kaj la prakristanismo ĝis la morto de Diokleciano (313 p.K.)

*Gerhard KALKHOF*

## 1. La antikva kulturo ĉirkaŭ Mediteraneo

Prefere la ekeston de la mediteranea kulturo determinas la kvazaŭaj luliloj de la homaro, Egiptio kaj Mezopotamio. Transdonante siajn valorojn al aliaj postsekvintaj popoloj, lokiĝintaj je la mediterana bordo, ili efikis certan civilizacian gradon, kiu egaligis ĉiujn tieajn sociajn strukturojn (ŝtatojn, civitojn, komercejojn) sub propreca difino, nomata "mediteranea kultur-orbito".

Certe tia unio, rigardata el la distanco de kelkmilo da jaroj, diferenciĝas laŭ la plej diversaj politikaĵoj, laŭ la plej malsamaj popoloj je devenoj, lingvoj – ties varioriĉeco ne limiĝas senfine – tamen ili ĉiuj kuniĝas per forta ligilo: nome la kredo kaj konfeso al ĉiela potenco, prezentata de la dioj, al kiuj ĉiuj popoloj donis nomojn laŭ siaj propraj lingvo kaj idearo.

Tia religia sinteno, determinata per la scienca nocio "politeismo", enordigis la regantojn laŭ iliaj rilatoj al la dioj. Parte ili sentis sin kiel plenumantojn de la dia volo, parte ili rangiĝis proksime al la dioj, kvazaŭ sacerdotoj. Tiel ĉiu reganto resp. reĝo adoris sian hejman patronan dion. Ankaŭ urboj posedis tiuspecan dian patronon adorendan, al kiu oni devis oferi.

Ĝenerale ĉiu diaĵo bildiĝis en ŝtona statuo, posedis templojn kaj sacerdotojn observantajn oficojn kaj oferaĵojn, kiuj sterniĝis sur altaroj, ofte plenarte dekoraciitaj, ĝuste kiel ankaŭ temploj kovris sin per sublimaj skulptaĵoj kiel esprimo de alta kulturo.

Ekskluziviĝis el tiu plenglora dia panteono nur du popoloj: la persoj kaj la hebreoj, adorantaj unu solan Dion. En Persujo la profeto Zaratuŝtro, grekigita Zoroastro, iniciatis la doktrinon de la konflikto inter *Ahura Mazdao*, dio de lumo, kaj Arimano, reganto de la ĥaosa

mallumo, do infero. Jena doktrino celas la venkon de la bona *Ahura Mazdao*, kiu sola regas kiel dio. Liaj servantoj estas la magoj, kvazaŭ sacerdotoj. (La ekesto de tiu religio datiĝas nur malprecize, eble inter la 10-a kaj 6-a jarcentoj a.K.)

La hebreoj (aŭ judoj) komencis sian kredon iom pli frue, eble dum la 13-a jarcento a.K., kiam la profeto Moseo kondukis la hebreojn for de Egiptio, kie ili vivis sklavece, kaj aŭdis la voĉon de Javeo, do Dio, el brulanta arbusto sur la monto Sanjo (aŭ Ĥorebo). Javeo destinis Moseon kaj lian tutan popolon al sia servo, donante la dekalogon kiel kredodevon. La posteuloj kondukis la hebreojn al Palestino (ĉ. 10-a jarcento a.K.). Tie en la ĉefurbo Jerusalemo ili konstruis grandan templon honore al Dio Javeo.

Ĉar la persa Dio kaj precipe la hebrea ne devis esti bildigitaj, tia "monoteismo" zorgis pri granda ĉagreno dum la antikva kulturo. La panteonaj dioj ja estis respektataj en majestaj monumentoj. Precipe la grekoj distingiĝis per sia adoro al la plejpotenca dio Zeŭso. Eĉ foje ia reganto akiris diajn honorojn, kiel Aleksandro la Granda.

Kulminis fine la diigo de surtera potenco en la romia imperio, efektivigante konflikton pli malmulte inter la antikva panteono – ties dioj estis toleremaj kaj grandanimaj – ol per la kontraŭstareco de la romia religio al la orientdevena kredo, implicanta obeon al unusola Dio. Finiĝis tiu konflikto, ŝajne nesolvebla, nur post kelkcentjara plensanga intertraktado.

## 2. La Romia Imperio kaj ĝia ekesto

Tia regno, plej konata kaj plej ampleksa de la antikveco, ĉirkaŭanta la tutan Mediteraneon kulmine, originis el tute malgrava urbo Romo, situanta meze de Italio. Laŭ legendo ĝi fondiĝis en 753 a.K. fare de la ĝemeloj *Romulus* kaj *Remus*, tion tradiciis postaj historiistoj – precipe *Livius* – por emfazi ĝian famecon. Efektive la urbo Romo ekzistis modeste en tiu regiono, kultivita de la etruskoj, altkultura popolo tie vivanta.

Situante en limregiono ĉe la rivero Tibero (tuj apud ties enbuŝiĝo en la maro), la urbo oportuniĝis al havenurbo kaj prosperis precipe regante la sudan regionon *Latium*. Certiĝas ke dum frua epoko (dum la 7-a kaj 6-a jarcentoj a.K.) la urbo memstariĝis, kondukate de reĝa dinastio, etruske devena, la Tarkvinioj. Kiam la lasta reĝo *Lucius Tarquinius Superbus* estis eksigita (laŭdire 508 a.K.), la romaj civitanoj regis sin mem. Farante kon-stitucion, ili instalis diversajn oficojn kaj du publikajn (aŭ popolajn) reprezentantarojn: la senaton kaj la popolan kunvenon. Inter la oficistoj elstaris la du konsuloj, pojare elektataj: ili anstataŭis la iaman reĝon. La senato reprezentis la eminentulojn, la patriciojn; la ĝenerala kunveno la plebon, la malaltrangan klason.



Tiamaniere la interna romia ŝtato funkciis dum pli ol kvin jarcentoj. Nur malmulte ĝi ŝanĝiĝis, ĉar la plebaro postulis rajtojn ne agnoskitajn. Kaŝita restis dum multe da jaroj tiu socia manko, ĉar la eksteraj politikaĵoj gloriĝis danke al la virtoj, modele uzataj de la civitanoj. Tiuj nome ne kontentiĝis regi la regionon *Latium*, kies italan dialekton ili alproprigis kiel sian gepatran lingvon: la latinan lingvon. Paŝon post paŝo Romo federiĝis kun najbaraj popoloj (aŭ triboj) lerte kaj laŭleĝe, ĝis la tuta meza Italio estis en ĝia mano – dum la 4-a kaj 3-a jarcentoj a.K.

Ĉar la suda Italio regiĝis kaj civilizis fare de grekoj – tial ĝi nomiĝis Grand-Grekio – Romo tie strebis vastigi sian regnon kaj nome sukcese, kaj rezultis ke ĝi alproprigis eksteritalajn regionojn, ankaŭ paŝon post paŝo, ĝis dum la 1-a jarcento a.K. multaj mediteraneaj regionoj apartenis al ĝia regno.

Ĉar nur la plej malmultaj el ili asociiĝis pace, senĉese militoj viciĝis unu al la alia, kaj la militistaro rangiĝis pli alte, prede ŝarĝite la romaj militistoj revenis hejmen, fariĝinte riĉaj. Tiel – unuflanke novriĉaj parvenuoj, aliflanke kadukiĝanta kampularo – pretiĝis konfliktema socia strukturo, kiu komenciĝis la 1-an jarcenton a.K.

Post kiam provis renversi la socian strukturon la fratoj *Tiberius* kaj *Gaius Gracchus*, sed vane, kaj diversaj ambiciaj militestroj diktatorece katenigis al si la ŝtatan potencon, la ĥaoso finiĝis per la ordiganta mano de du membroj el la "iulia" familio: *Gaius Iulius Caesar*/Cezaro kaj lia nevo *Octavius/Octavianus*. Kondukante respektive venkante en intercivita milito, Cezaro establis dumvivan diktatorecon, ordigis kaj reformadis la ŝtaton, fariĝantan plenpotenca imperio, ĝis lia murdo (je la 15-a de marto 44 a.K.) preskaŭ disfaligis la imperion: tiun reordigis lia adopta filo *G.I.C. Octavius*. Tiu, ankoraŭ tre juna, sin pretigis por ekposedi la heredaĵon de sia parenco rifuzatan al li. Li sukcesis, kaj inside kaj perforte, cedigi siajn antagonistojn. La lastan el ili, *Marcus Antonius*, li venkis en marbatalo ĉe *Actium* (31 a.K.). Finiĝis nun iuj intercivitanaj kvereloj, kaj *Octavius*, kiu de tiam sin nomis *Octavianus*, establis novan reĝimon,

ĝis tiam nekonatan. Kvankam li provis kaŝi sian altrangecon – la senaton neniam li alfrontis – la aŭtoritato de lia potenco distingis lin kiel "*princeps*", la unuan civitanon de Romo, de urbo, plej respondeca.

Sciante ke la rom-urbanoj, kaj precipe la senato, abomenas ĉian formon de reĝa tiraneco, *Octavianus* evitis prezenti sin aŭtokrate. Ĉiam la senaton li igis fari decidojn proponitajn de li, inverse la senato ekipis lin je prerogativoj kvazaŭ delege. Prudente kaj sagace *Octavianus* profitis la honoron dankeme, ĝis tia honorigo devigis lin redoni la prerogativojn (januaro, jaro 27-a a.K.); la senato ne sole rifuzis akcepti la procedon, sed ankaŭ distingis lin per titolo plejaltranga, ekvivalenta al la diaĵo: *Augustus*.

Ekuzante sian tutan potencon, Cezaro Aŭgusto – je tiu nomo li enhistoriiĝis – plukonstruis kaj kompletigis sian grandegan regnon, la "Romian Imperion", kiu regis super ĉiuj landoj, ĉirkaŭantaj Mediteraneon; la lastaj breĉoj, fermataj nun, estis Gallio, Britujo kaj Germanujo je ĝiaj sudaj kaj okcidentaj flankoj limigitaj de la riveroj Danubo kaj Rejno. (Malvenko en Teŭtoburga arbaro de 9-a jaro p.K. devigis Aŭguston rezigni pri konkerado de la tuta Ĝermanio.)

Ĉefe Cezaro Aŭgusto kreis novan regoformon, la "principaton". Nek monarĥio, nek demokratia kunveno difinis la regnodecidojn, sole viro, sin distinganta per sia aŭtoritato, kaj liaj regokapabloj reprezentis kvazaŭ plej nobla ŝtatano, kvazaŭ la unua civitano, do la „*princeps*", la grandan imperion. Ĝin li administris kiel propraĵon, ĉiujn ŝtatajn enspezojn kaj elspezojn, do la impostojn, li kontrolis kaj responsis pri ili. Tiel la "principato" kunfluigis ĉiujn ŝtatajn funkciojn, prizorgatajn de oficistoj, jam deĵorintaj dum la antaŭirinta respublika epoko. Tiam ili responsis al la senato, nun al Cezaro Aŭgusto. Kulmine kaj aldone tiu akiris la plej altan rangon de sacerdotaro, nomiĝanta "*pontifex maximus*" (lat. "plej altranga pontofaranto"). Kiam li mortis (19-an de aŭgusto 14 p.K.) lia animo ateste ascendis al la ĉielo kaj fakte fariĝis dieca, kiel principe ĉiuj liaj posteuloj akiris diecan dignon, kaj ili devis esti adorataj kiel la grandaj dioj.

Kompreneble praktigi administran potencon kaj limigi ĝian perforteсon estis la plej grava funkcio de Cezaro Aŭgusto. Per tio li sukcesis fine ankaŭ venki siajn konkurantojn kaj daŭre konservi la cezaran heredaĵon. Tial li portis la militrangan titolon: imperatoro.



Cezaro Aŭgusto zorgis precipe pri la estonteco de la regosistemo, kreita de li. Saĝe konsiderante, ke la plej regokapablaj politikuloj estru la imperion, li proponis la adoptadon de tia eminentulo fare de la reganto; ekz. la adoptita filo heredis plenresponse la imperion – kun ĉiuj rajtoj, prerogativoj, titoloj, posedaĵoj – de sia adopta patro.

Paralele alia tendenco ekzistis, la vere monarĥia, do ke cezara patro transdonis siajn prerogativojn al filo, kiu postsekvu lin. Sed tiu tronsekva ordo malaprobiĝis grandparte. Jam Cezaro Aŭgusto destinis kiel posteulon sian duonfilon *Tiberius*, adoptante lin publike. Tia ceremonio signifis, ke *Tiberius* sekvos Cezaron Aŭguston kiel imperiestro respektive "cezaro" post lia morto.

Kvankam la dinastia politiko ofte uzebliĝis, tamen adoptado legitimiĝis kiel bazo de la romia cezarismo kaj certigis konstantan, paceman eraon, markantan la tri jarcentojn de la cezaroregno, ĝis la regada situacio ŝanĝiĝis funde.

## 3. La kristanoj kun sia komuneco, la eklezio

Dum la regado de Cezaro Aŭgusto okazis certe renverso de la politikaĵoj. Kun jarcento de intercivitana milito alternis la "*pax romana*", la daŭra romia paco. Sed la temposanĝo – kial ĝi turniĝis de unu flanko al alia? Kial Cezaro Aŭgusto naskiĝis "antaŭ nia tempo", kaj kial li mortis "dum nia tempo", kiel certaj historiistoj notas?

Neeviteble ne sole diotima kristano alkroĉiĝas je Jesuo Kristo la Mesio, kiu naskiĝis dum la 31-a regojaro de Cezaro Aŭgusto, sed ankaŭ ĉiu, kiu flankeniras kaj nur el nebuleca malproksimeco akompanas la historiaron, konstatas spiritan transformadon.

Kaŭzita de la plivastigado de la Romia Imperio paŝon post paŝo, ĝuste dum la regado de Cezaro Aŭgusto kulmino anonciĝis, la romianoj konatiĝis kun la antikvaj romaj dioj, sed ankaŭ aliaj vere fremdaj dioj kaŝe iris en la ĉielon, regatan de Jupitero (aŭ similnome Jovo) kaj liaj subdioj. Precipe el la oriento allogis mistera kulto, servanta al soleca lumdio, tiu de Mitrao, kiun preferis granda parto de la militistaro.

Certe apartan atenton elvokis la judoj, kiuj adoris dion nevideblan en la templo de sia ĉefurbo Jerusalemo. Tio estis absurda imago por la romianoj kaj grekoj, kiuj adoris siajn diaĵojn grandstaturaj kiel valoregaj artaĵoj.

La ĝenerale grandanimaj romianoj ne ĝenis sin pri la multfaceta pieco, kiun la diversnaciaj dioj postulis; ili kontentiĝis per la respekto kontraŭ la diigitaj imperiestroj, ekde komence de Cezaro Aŭgusto. Vid-al-vide de la judoj granda abismo malfermiĝis: laŭ ilia religio homo – ankaŭ se diigita ŝtatestro – ne egalas al la eterna dio kaj ne devas esti adorata.

Certe la judoj pagis pro tiu sakrilegio. La romianoj faris militon, totale detruis Jerusalemon kun la templo kaj dispelis la judojn el ilia lando (70 p.K.). Sed ilian zelotecon substituis nova religio, ekkreskinta el ilia mezo, personiĝinta en Jesuo Kristo (aŭ Mesio), la filo de dio, instruanta novan doktrinon, punmortigita sur la kruco, kaj fine resurektinta (ĉ. 30 p.K.). Certe tiu movado estus restinta efemera sekto, se ĝi ne estus disvastigita de siaj apostoloj, precipe de la sankta Paŭlo en la ĉirkaŭ-palestinaj regionoj. Iom post iom fondiĝis en la urboj de la Romia Imperio komunumoj, kiuj kaj vivis laŭ la doktrino de Jesuo Kristo kaj sin apartigis de la aliaj kunurbanoj.

Per tiu apartiĝanta vivmaniero – laŭ la ĝenerale uzata greka lingvo "*Koinè*" (κοινη) la kristanaj komunumoj baldaŭ nomiĝis "*ecclesia*" (ἐκκλησήα), esperantigite "eklezio", ili suspektiĝis je abomeninda superstiĉo. Misteriĝis la kunvenoj, implicantaj vortojn kaj agojn de ilia savanto Jesuo Kristo, prezentatajn de apostoloj kaj postapostoloj aŭ predikantoj, kaj la "komunion" (aŭ eŭĥaristion).

Ekster la diservoj la komunumanoj solidariĝis, helpante unu la alian, do, kiam tiaj komunumoj penetris en la publika vivo de la urboj kaj ĝiaj laboroj diferenciĝis, ili elektis intendanton, laŭ la *koinè* nomata *episkopos* (ἐπίισκοπος), esperantigita "episkopo" (signifanta: protektanto, administranto). Kiel multaj metioj ili societiĝis kvazaŭ kluboj, en *koiné* nomataj *hetaeria* (ἑταιρεία).

Entute dum la 1-a jarcento p.K. tiuj kristanaj komunumoj ekzistis neĝenate. Ĉar ne estis multaj romianoj, kiuj sciis pri tiu juda mesio, diranta ke lia regno ne estas ĉi-monda.

Malgraŭ la suspekto, ŝarĝanta ilin pri ebla sangadulto, la unuaj kristanoj ne trafis persekutadon aŭ eĉ punon, escepte de tio ke ili rifuzis adori diigitan imperiestron kaj oferi al li, aŭ se ili, denuncite, same rifuzis, pridemandite, malkonfesi Jesuo Kristo; alie mortpuno minacis. Ofte plenkonscie ili elektis kruelan morton – esti disŝiritaj de sovaĝaj bestoj en cirko kiel spektaklo por spektema popolamaso – nur por sekvi sian sinjoron Jesuo Kristo en sang-atesto kiel martiroj.



Sed grandskala martirigado okazis pli poste, kiam, atentigante la popolamason, la kristanoj mortis pro sia konfeso, la eklezio plivastiĝis, kaj kiam la romiaj imperiestroj eksciis ĝin kiel publikan danĝeron, limigendan kaj detruendan.

Krom la roma incendio, kiam Nerono kulpigis la kristanojn pri tiu brulfarado, kondamnante ilin al brulantaj torĉoj kiel iluminado de la palacoĝardenoj (64 p.K.), tiu frua epoko de la kristaneco ne rezultigis persekutadon de kristanoj. Nur post kiam la kristaneco estis ekkaptinta la urbegojn, unue la ĉefurbon Romo, la ŝtatestraro ekkonis en ĝi konkuranton ne sole en religiaj sed ankaŭ en ŝtataj aferoj tiom pli multe, ĉar laŭ la romia ŝtatkoncepto publikigaĵoj kaj diaĵoj integriĝis unu en la alia – kiun la kristaneco implicis ne urĝa.

Do, post du jarcentoj unuopaj imperiestroj estis devigataj, agi kontraŭ la kristanaj komunumoj. Je duobla maniero la verdiktoj realiĝis: aŭ publike unuopaj kristanoj devis malkonfesi sian „Savinton" Jesuo Kristo – kion nur malmultaj faris, la plej multaj preferis morti kiel martiroj – aŭ tuta eklezia komunumo estis malpermesata, la klerikoj enkarcerigataj, la havaĵo konfiskata inkluzive domojn kaj preĝejojn.

Tiel imperiestro *Septimus Severus* dekretis kontraŭ judoj kaj kristanoj dum la jaroj 202 kaj 203 p.K. Same *Decius* disponis (en 250) kaj tuj poste, sub *Valerianus*, la persekutado krueliĝis (en 257 kaj 258), kvankam ties propra filo *Gallienus* inklinis al la kristaneco kaj proklamis ĝin lica (259).

El tiu fakto evidentiĝas, kian staton la kristana eklezio tiam (fine de la 3-a jarcento p.K.) atingis. Ĝi ne plu estis "apenaŭ rimarkebla minoritato", ĝi ne plu estis sufokebla kaj ne plu metebla en malvastajn ĉirkaŭbaritajn spacojn.

Jam delonge ĝia voĉo sonadis super ĉiuj mondumaj tavoloj de la romianaro: unue simplaj, neeruditaj homoj akceptis la kristanan mesaĝon. Sed poste ankaŭ filozofoj kaj eruditoj okupiĝis pri ĝi, des pli multe ĉar la plej diferencaj mondkonceptoj centriĝis je la problemo, ĉu ekzistas unusola dio aŭ multaj dioj, tradiciataj el la grekolatina universo.

Precipe la filozofo Plotino revekis la idearon de la greka filozofo Platono (viv. 429-347 a.K.) tiamaniere, ke li refreŝigis la temaron de "idea supernatura mondo", regata de plej alta spirita estaĵo, staranta eĉ super la dia patro Zeŭso.

Do, necesiĝis – pelate de la plotina kaj aliaj filozofiaj skoloj – ke la malnova roma religio renoviĝus, ĉar ties diservo profaniĝis, ankaŭ la dioj mem mokfiguriĝis teatraĵe. La provoj de diversaj imperiestroj reformi la sintenon kontraŭ la diaĵoj, malpermesante la kristanecon, malsukcesis. La kredkonfeson al Jesuo, kiu savas la homaron per sia sango, verŝata sur la kruco, ne ebliĝis substitui eĉ per la plej subtilaj filozofiaj spritaĵoj. Ĉar la nova kristaneca religio kortuŝis precipe homojn suferantajn kaj maleruditajn, kvankam de tempo al tempo altranguloj konvinkiĝis pri la supereco de la kristanaj kredo kaj vivmaniero, fontantaj el la dia amo kaj realiĝantaj per la diakona servo.

Ne mirinde ke de tempo al tempo la nobelaro, ankaŭ la senata, inklinis al la kristaneco, laŭdire eĉ la kortego de la imperiestro *Domitianus* (reg. 81-96) serĉis kontakton kun la nova kristana religio. Kvankam juĝate superstiĉa, ĉar ĝi kontraŭstaris la roman koncepton de la "*do, ut des*" (signifanta ke mi adoras la diojn, por ke ili min subtenu), ĝi vere finis la agadon de la hereditaj romaj haruspeksoj, kiuj okupiĝis speciale pri la esploro de la internaĵoj de oferitaj bestoj. La pastroj estis nomataj haruspeksoj. Same ĝi batalis kontraŭ la siatempaj spiritaj tendencoj: la Mitra-kulto, la novplatonismo de Plotino kaj ĉiuj astrologiaĵoj inkluzive la magion, kaj tio bonrezulte.

### 4. La tetrarĥio de Diokleciano

Fine de la 3-a jarcento duobla krizo anonciĝis: la religiaj cirkonstancoj per la kontrasto de la nova kristanismo kontraŭ la kadukiĝinta, malnova roma dia panteono, kaj due la imperiestreco stiriĝis al ĥaoso, ne plu observante la regularon de Cezaro Aŭgusto. Dum la jaroj 251 ĝis 284 minimume 40 imperiestroj, vicimperiestroj kaj kontraŭimperiestroj sekvis unu post la alia – murde, perforte, proklamite de la legioj diverslandaj.

Kiel multaj aliaj imperiestroj ankaŭ imperiestro *Numerianus*, reveninte el milito kontraŭ la persoj, mortis embuske kaj perforte (384). Tial la militestroj elektis novan imperiestron dum restado en Nikomedio, nomitan *Diocles*. Tiu, deveninta el malnobla klaso, sed karieriĝinta militestre, nun alprenis preskaŭ novan nomon: Diokleciano (*C. Aurelius Valerius Diocletianus*). Liaj haruspeksoj favoris lin, ĉar ne sole la murdinton de lia antaŭulo li trafis per sia glavo, sed ankaŭ la kontraŭstarantan imperiestron *Carinus* li devis rezisti, cetere vane, sed feliĉe, ĉar tiu finiĝis murde (285).



Diokleciano, spertinta per tiu evento kaj kiel multmerita oficiro sciante la dekadencan staton de la ŝtatestrado (per laŭleĝaj kaj kontraŭleĝaj imperiestroj), enkondukis novaĵon: li dividis en kvar partojn la kolosegan Romian Imperion. Ĉiun parton de tiu ĉi "tetrarĥio" regis memresponse imperiestro. Li mem staris super siaj "kolegoj" kvazaŭ super-imperiestro. Unu el liaj kolegoj tamen samrangis kun li, titolita "Aŭgusto". Tiu estis *Valerius Maximus*, proklamita de li Aŭgusto (je la 1-a de aprilo 286), ne adoptite, tial samrege kaj amikece.

La efektiva tetrarĥio komenciĝis je la 1-a de marto 293, kiam Galerio (*C. Galerius Valerius Maximianus*) kaj Konstancio (*C. Flavius Valerius Constantius*) imperiestriĝis ordone de Diokleciano, titolitaj "Cezaro". Ili kunregis kun la Aŭgustoj kaj estis destinataj sekvi tiujn pli poste laŭ la adopta leĝo.

Diokleciano elpensis tian subtilan "sistemon de kvazaŭa imperiestra familio" – la komuna familia nomo *Valerius* elprenita de *Maximianus*, *Galerius* kaj *Constantius* celis al tia unio – por eviti pluan implikan staton de uzurpado de samregado respektive kontraŭregado de pluraj romiaj imperiestroj. Krome li strebis, ke post kelkaj jaroj li kun *Maximianus* rezignu kaj Galerio same kun Konstancio anstataŭu ilin kiel "aŭgustoj", instalante du novajn "cezarojn".

Kvankam li atribuis al ĉiu kun- aŭ subreganto limigitan regionon – li mem staris super la orientaj diocezoj, lia cezaro Galerio super la danubaj diocezoj, Maksimiano super Italujo, Afriko kaj Hispanujo, kaj ties cezaro Konstancio super Gallio kaj Britujo – neniu el ili regis prokure. Ĉiam kaj ĉien Diokleciano rajtis pri iliaj servoj, do sendi ilin en limregionojn, danĝerigitajn de barbaraj triboj.

Nun paco kaj malribeloj encirkligis la dioklecianan regnon, kaj la imperiestro paŝis al reformo, kiu kronis lian tutan regadon: Okaze de la 20-a datreveno de sia regno li vojaĝis okcidenten al Romo, por tie festi la jubileon pompe kaj glore (303), la "*vicennalia*" (= dudekjariĝon). Triumfado kun la "predo" el la persa militiro montris, kiom Diokleciano altiĝis al dieco. Tiasence li amnestiis multajn punotojn, krom kristanoj. Tiu agado koincidis kun religia reformo: i.a. malnovaj romaj moroj kaj kultoj reaktiviĝis, memorantaj la eternan Romon. Ĝian panteonon, el oriento, enmigris efektive la persa dio Mitrao, ĝenerale nomata "*sol invictus*", sundio nevenkebla. Ankaŭ la pozicio de la imperiestro solidiĝis, lia diaĵo montriĝis je la oferdevo. Kiu rifuzis, perdis sian oficon, aŭ publikan aŭ militan.

Celis Diokleciano per tiuj aranĝoj ekstermi la kristanecon, kiu jam en 299 malaprobiĝis pli akre, sed per dekreto (de la 23-a de februaro 303) li efektivigis kruelan persekutadon, superantan ĉiujn antaŭirintajn. La granda katedralo en Nikomedio eĉ malkonstruiĝis, antaŭ ol la dekreto ekpublikiĝis. Nun per tri dekretoj severeco kaj rigoro por estingi ĉion kristanan progresadis: sendepende, ĉu konfesanta kristano eble meritis proprakulpe mortpunon, ĉiuokaze ĉiujn siajn prerogativojn tia kredanta oficisto perdis kaj enprizoniĝis. Ankaŭ la klerikoj eniris prizonojn, atendante turmentoplenan vivofinon; la eklezian bonhavaĵon la ŝtato entute konfiskis.

Ŝajne influe de la diversspeca koncepto, laŭ kiu la tetrarĥoj procedis – *Galerius* pliakrigis la persekutadon en sia ĉedanuba regiono, kontraŭe *Constantius* plimildigis la punigadon, indulgante pentemulojn en Gallio – la terura persekutado finiĝis alie ol tiuj atendis: La publiko ne plu ĝuis la sangokovritajn homoviktimojn, kiuj laŭtvoĉe laŭdis Jesuon; naŭzon oni sentis. Certe la kristanismo ne ĉesis, sed pluvivis, eble kaŝe. Eble sekrete la nobelaro aŭ eĉ membroj de la imperiestra familio inklinis al ĝi. Tiel tiu lasta persekutado de kristanoj en la Romia Imperio fiaskis; evidentiĝis tiu fiago, kiam en 311 Galerio proklamis tolereman edikton. Tio signifis kolapson de la diokleciana religia reformo. Ankaŭ la politika tetrarĥia sistemo finiĝis malbone. Unue Diokleciano rezignis kune kun sia kunbatalanto *Maximilianus* (je la 1-a de marto 305 en Nikomedio), la cezaroj Galerio kaj Konstancio sekvis ilin ascende kiel aŭgustoj, post kiam Diokleciano nomumis du novajn cezarojn: *Severus* (*Flavius Valerius Severus*) kaj *Maximinus Daja* (*G. Valerius Maximinus*). Kooperative kondukite de Diokleciano, la tetrarĥio ne plu funkciis: Galerio ne povis malcedi kontraŭ la aliaj sampoziciuloj, el kiuj ĉiu postulis siajn rajtojn. Perforte ili agis, ĝis – kvazaŭ kulmine – Diokleciano vokite devigis Konstantinon*, la filon de *Constantius*, ĵus mortinta, rezigni pri la tetrarĥia ofico de aŭgusto kaj kontentiĝi kiel cezaro favore al Licinio (*Valerius Licinianus Licenius*), kiu kune kun Galerio regis kiel "aŭgusto" (308, dum konferenco en *Carnuntum*).

.....................

* Piednota rimarko: Kvankam PIV (eld. 1981, p. 556) tekstas kun la nomo de la imperiestro "Konstanteno", mi ne pensas ĝusta, uzi tiun formon de interŝanĝado de i al e, nur por distingi de la alĝeria urbo samnoma, originale skribita "*Constantine*", sed en PIV per "Konstantino". Interŝanĝado apenaŭ povas okazi, ĉar la kunteksto almontras ĉiam la imperiestron, kaj neniam la urbon. Krome la imperiestro Konstantino donis al la antikva urbo *Kirtha / Cirta* sian nomon.



## Nomenklaturo

| Esperanto | Latina lingvo | Alia lingvo |
|---|---|---|
| Ajakso (P) | *Ajax* | *Ajas* (gr) |
| Aleksandrio (G) | *Alexandria* | *Alexandreia* (gr) |
| Bizanco (G) | *Byzántium* | *Byzántion* (gr) |
| Bulonjo ĉe maro (G) | *Gessoriacum* | *Boulogne-sur-Mer* (fr) |
| Karnunto (G) | *Carnuntum* | *St. Petronell* (de) |
| Ĥrizopolo (G) | *Chrysopolis* | *Üsküdar* (tr) |
| Danubo (G) | *Dānuvius* | *Donau* (de) |
| Diokleciano (I) | *Diocletiānus* | *Diocleziano* (it) |
| Domiciano (I) | *Domitiānus* | - |
| Eburako (Jorko) (G) | *Eburacum* | *Yorck* (en) |
| Egiptio, Egiptujo (G) | *Ægyptus* | *Misr* (ar) |
| Faŭsto (P) | *Fausta* | - |
| Gajo Julio Cezaro (I) | *Gaius Iulius Cæsar* | - |
| Hadrianopolo (G) | *Hadrianopolis* | *Edirne* (tr) |
| Heleno (P) | *Helena* | *Elēnē* (gr) |
| Helesponto (G) | *Hellespontus* | *Dardanellen-Straße* (de) |
| Homero (P) | *Homērus* | *'´Omeros* (gr) |
| Honorio (I) | *Honorius* | - |
| Iliono (G) | *Ilium / Ilion* | *'Ilion* (gr) |
| Juliano (I) | *Iūliānus* | - |
| Jerusalemo (G) | *Hierusolyme* | *'Ierosōlyma* (gr) |
| Jupitero (P/D) | *Iuppiter* | - |
| Ĥalcedono (G) | *Chalcēdōn* | *Kadiköj* (tr) |
| Kaledonio (G) | *Calēdonia* | *Scotland* (en) |
| Konstancio (I) | *Constantius* | - |
| Konstantino (I) | *Constantinus* | - |
| Konstantinopolo (G) | *Constantīnopolis* | *Konstantinópolis* (gr) |
| Kordovo (G) | *Corduba* | *Cordoba* (es) |
| Latio (G) | *Latium* | *Làzio* (it) |
| Livio (P) | *(Titus) Livius* | *Lìvio* (it) |
| Milano (G) | *Mediolānum* | *Mailand* (de) |
| Niŝo (G) | *Naissus* | *Niš* (sr) |

| | | |
|---|---|---|
| Nerono (I) | *Nerō* | - |
| Niceo (G) | *Nicæa* | *Iznik* (tr) |
| Cezaro Oktaviano (I) | *Gaius Iulius Cæsar* | *Kaiser Augustus* (de) |
| Aŭgusto (I) | *Octaviānus Augustus* | - |
| Pado (G) | *Padus* | *Po* (it) |
| Palestino (G) | *Palæstīna* | *Palaistīnè* (gr) |
| Platono (P) | *Platō* | *Πλατων* (gr) |
| Ponto Milva (G) | *Pons Milvius* | *Ponte Molle* (it) |
| Rejno (G) | *Rhēnus* | *Rhein* (de) |
| Remo (P) | *Remus* | - |
| Romo (G) | *Rōma* | *Róma* (it) |
| Romulo (P) | *Rōmulus* | *Ròmolo* (it) |
| Sofio (G) | *Serdica / Sardica* | *Sofia* (bg) |
| Tarkvinioj (P) | *Tarquinii* | - |
| Teodora (P) | *Theodora* | - |
| Tesaloniko (G) | *Thessalonīcē* | *(Thes)-Saloniki* (gr) |
| Tiberio (I) | *Tiberius* | *Tibèrio* (it) |
| Tibero (G) | *Tiberis* | *Tiber* (de) |
| Tiruso (G) | *Tyrus* | *Týros* (gr) |
| Treveri (G) | *Augusta Treverorum* | *Trier* (de) |
| Trojo (G) vd. Iliono | *Troia* | *Troja* (gr) |

**Klarigo de la mallongigoj**

| | |
|---|---|
| G = nomo de geografiaĵo | ar = araba lingvo |
| I = nomo de imperiestro | bg = bulgara lingvo |
| P = nomo de persono | gr = greka (malnovgreka) |
| P/D = nomo de Dio | es = hispana lingvo |
| en = angla lingvo | it = itala lingvo |
| fr = franca lingvo | sr = serba lingvo |
| de = germana lingvo | tr = turka lingvo |

**Adreso de la aŭtoro**
*Gerhard Kalkhof*
*An der Ritsch 17*
*DE – 36341 Lauterbach* / GERMANIO

**Priaŭtora informo**
Emerita instruisto, komencis 1978 verki lokajn historiaĵojn kaj historiajn skizojn. (Bedaŭrinde ni ricevis la funebran sciigon, ke la aŭtoro forpasis. Nekrologo sekvos en SR 2/2006.)



# Egalrajteco kaj ekonomieco en la internacia komunikado [1]

*Ottó HASZPRA**

## Enkonduko

Estas sufiĉe ĝenerala, kvankam ne tro konata fenomeno, ke la interesiĝo de la natursciencaj kaj teĥnikaj esploristoj, precipe en sia iom alta aĝo, turniĝas al la socisciencoj, artoj kaj certaj pli ĝeneralaj problemoj de la homaro. Do, kial ne la dua, do ordamembra[4], seĝokupa prelego povus prezenti ian ne-ĉefokupan temon, kvazaŭ "violonon de *Ingres*" [5]?

Mi mem – krom mia inĝeniera profesio – plurfoje okupiĝis pri la laŭeble optimuma solvo de la lingva problemo de la Eŭropa Unio, eĉ de tiu de la tuta mondo. "Optimuma solvo" signifas: la plej malmultekosta kaj samtempe ankaŭ ekonomie kaj politike sendiskriminacia solvo por lingve kapabligi ĉiun homon por laŭplaĉe fari, utiligi kaj ĝui pacajn internaciajn kontaktojn (kulturajn, teĥnikajn, sciencajn kaj amikajn).

Ĉio ĉi estas realigebla per lingvo, kiu estas **viva**, tamen multe pli facile lernebla ol kiu ajn **nacia** lingvo: ĝi estas la internacia lingvo Esperanto. Esperanto estas arte – eĉ belarte – renaskita, simpligita kaj alte esprimiva moderna posteulo de la nekonata praulo de la hindeŭropaj lingvoj kaj la plej bona komuna ido de ĉi lastaj.

## Pri la pasinteco de la internacia komunikado

Nur skize trakurante la historion de la interkomunikado de diverslingvaj komunumoj, la paca versio de la komencaj kon-

* Memore al la hungaraj akademianoj esperantistaj, de *Sándor Giesswein* [2] ĝis *Károly Simonyi* [3]